

NORMANDA ESPERANTO BULTENO

N° 266

Septembro 2016

Redaktas : Yves Nicolas, 14 place Laënnec, 14 000 Caen. Tel. 06 44 87 22 48
ivnicolas@sfr.fr Enpaĝigas : Michèle Langeois

Abon-kotizo : 10 €. « Esperanto – Normandie ». C. C. P. 283.40 H Rouen

Kasisto : Jean Colombel, 8 allée des Maraîchers, 76 290 Montivilliers



Adhésion-Abonnement 2016

Liste des personnes à jour au 1er septembre.

Adele O., Badmington J.,
Besneville A., Bonnet S., Bony P.,
Caron S., Chalm A., Chaplain M.,
Colombel J., Cottin B., Dubois A.,
Dufeu P., Dufresne B., Dulin G.,
Duval D., Duval E., Etienne P.,
Ferrand C., Fortin F., Freslon P.,
Gascoin J., Gibert G., Girard V.,
Glemot F., Groult J-C., Gueroult G.,
Guillemet J., Guillon J-P.,
Guilmot R., Hubert M., Jehenne
Ledran N., Jouvin P., Langeois M.,
Lebreton J., Lebrun R., Leguillon
Decosse H., Lemarchand P.,
Leprevost A-M., Lesieur A.,
Levesque C., Loisel A., Longuet J.,
Magerel J., Marie F., Martial J.,
Maurau B., Nicolas Y., Paumier M.,
Quillaud P., Robiolle P., Rolland Y.,
Rousseau H., Sauvage J-P.,
Schertzer J., Senecal G., Sery S.,
Troisgros R., Zilliox P.

Plusieurs personnes ne sont pas à jour de leur cotisation pour cette année. Il n'est pas trop tard et c'est important pour la vie de notre association. ! **Merci d'y penser.**

La vorto de Christian

ĈIUJ EN GRANVILLE LA 8an DE OKTOBRO !

Karaj amikoj,

Pasintjare, la grupo de Le Havre invitis nin por tre interesa kaj sukcesplena vizito de sia urbo. Ni tre ĝojas, ke la dua rendevuo okazos en nia urbo Granville, ĉe la alia flanko de Normandio.

Ankaŭ Granville estas fama haveno kun longa historio. Dum tuttaga promenado ni rakontos ĝin al vi. La citadelo estis okupita de la angloj dum la centjara milito. Ĝi poste fariĝis granda fiŝhaveno kaj rendevuo de famaj korsaroj. Ĝia antikva urbo altiras multajn turistojn pro vidindaj panoramoj, promenejoj, monumentoj, muzeoj.

Ni kune pasigu agrablan tagon en Granville, la « Monaco du Nord », la 8an de oktobro !

Por la grupo Sud-Manche,
Christian LEVESQUE



Bulletin d'inscription

p.10

Ne pas oublier

Enhavo

- p. 1 La vorto de Christian Levesque
liste des personnes à jour de leur cotisation
- p. 2 Compte-rendu de l'A.G de Normandio à Montivilliers
- p.3 Miaj unuaj esperantistaj paŝoj. Henri Rousseau
- p.4 Vojaĝo en Baltio. I. Greken
- p.5 Japanoj turismas. Gérard kaj Gigi
Humuraĵoj. Josef Shemer
- p.6 Normandino en S.A.T kongreso
- p.7 Ha ! la bela normanda somera. Michelle Paumier
- p.8 Kio nova ? Nouvelles des clubs
- p. 9,10 : La 8 an de oktobro : **Ĉiuj en Granville**

Compte-rendu de l'Assemblée Générale du samedi 28 mai à Montivilliers.

Une AG culturelle

Notre Assemblée Générale est surtout et d'abord un moment de convivialité particulièrement intéressant cette année dans une jolie petite ville dont nous avons découvert quelques joyaux grâce au maître des lieux, Jean Colombel, notamment durant la visite guidée et fort bien documentée en espéranto de l'Aître de Brisgaret par **Sylvie Caron**.

Nous avons eu droit à **trois conférences** très différentes les unes des autres.

Pascal Dubourg-Glatigny, enseignant et chercheur au CNRS sur l'histoire de l'art, a fait une présentation étonnante et nouvelle, pour la plupart d'entre nous, sur l'utilisation très récente de l'espéranto par des artistes très engagés de différents pays.

Alain Chalm, espérantiste local et ancien bijoutier, est lui aussi un artiste et un bricoleur de génie qui a ravi l'auditoire en commentant nombre de ses œuvres exposées.

La journée s'est conclue par un exposé d'**Abdurahman Junusov** sur le Daghestan (République de la Fédération de Russie), dans le cadre de sa tournée de conférences invitée par Espéranto-France. Son intervention très appréciée a également porté sur l'art traditionnel et la culture en général de son étonnant pays.

Effectifs et budget

Le groupe du Havre a accueilli dans une salle paroissiale les 25 participants de notre assemblée générale normande. Les cinq départements de notre région étaient représentés mais 6 personnes s'étaient excusées pour raison de santé, de distance, de vacances... ou par manque de carburant dans les stations bloquées par un mouvement de grève.

Notre association comptait 71 membres à jour de leur cotisation en 2015 et 60 d'entre elles avaient réglé celle de 2016 avant ou pendant l'assemblée de Montivilliers. Les retardataires seront recontactés par notre trésorier, Jean Colombel, et par les représentants départementaux.

Depuis notre dernière assemblée générale, trois personnes sont décédées : Gisèle Michaud et Jean Martial dans la Manche ainsi que Damien Roets dans le Calvados.

L'avoir en trésorerie était à ce jour de 2 549,17 € (en janvier, l'exercice clôturé pour 2015 totalisait 2 269,41 €). Les cotisations annuelles s'élèvent à près de 700 € ; elles couvrent les frais de bulletin (3 numéros par an, environ 450 €), l'accueil de conférenciers étrangers, et autres frais d'organisation (réservation de salle, aide éventuelle aux associations locales, déplacements, etc).

Les comptes tenus par **Jean Colombel** ont été contrôlés par Alain Chalm et font apparaître une gestion saine qui permet d'envisager une activité plus intense de l'association normande.

Le bulletin paraît trois fois l'an sur 8 pages.

Il est pris en charge par le groupe d'Hérouville avec une mise en page soignée et appréciée assurée par

Michèle Langeois. Plusieurs personnes ou groupes ont envoyé leurs articles et ont ainsi contribué à la diversité du contenu. Certains articles un peu longs ont été condensés mais certains lecteurs, ou auteurs, préféreraient qu'on les publie en entier en indiquant « suite au prochain numéro ». Le numéro de janvier sera expédié à tous les membres à jour ou non de leur cotisation mais seules les personnes à jour de leur cotisation recevront les deux numéros suivants. Prévoir un tirage un peu plus important pour une distribution aux nouveaux venus dans les groupes.



Le compte-rendu financier.

De gauche à droite : Patrice Dufeu, le président Yves Nicolas et le trésorier Jean Colombel

Nos activités

La visite guidée du **Havre** à l'automne 2015, très bien organisée, a plu à tous les participants (consultable sur le site : www.facebook.com/HavreEsperanto).

Celle de 2016 sera organisée par le groupe de la Manche le **8 octobre** pour une visite pleine de promesses dans les rues escarpées de **Granville**.

La venue de conférenciers - le chinois Zhang Fude, le russe Aleksandro Melnikov- et la venue de la correspondante polonaise de Christian sont à encourager. Il est souhaitable qu'ils soient accueillis par tous les groupes.

Notre activité se concentre dans le Sud-Manche (Granville et Avranches), Rouen, Le Havre, Hérouville et Flers. C'est d'ailleurs dans cette ville que se tiendra notre prochaine assemblée générale à une date encore à confirmer (samedi 13 mai ou 10 juin 2017).

Le Conseil d'Administration est reconduit

Yves NICOLAS et Gérard SENECAI pour le Calvados, Barthélémy MAURAU pour l'Eure, Christian LEVESQUE pour la Manche, Anne-Marie LEPREVOST pour l'Orne, Sylvie CARON et Jean COLOMBEL pour la Seine-Maritime. Alain CHALM (76) assure le contrôle de gestion.

Presse

L'Assemblée Générale a donné lieu à un article avec photo dans Paris Normandie (à lire sur internet). Merci à la famille Colombel et au groupe du Havre pour ce bon accueil !

à partir du compte-rendu de réunion de la secrétaire de l'association, **Anne-Marie Leprévost**.

Normandino en S. A. T. kongreso...

en Sieber, komunumo de Herzberg am Harz, Germanujo, de la 16a ĝis la 23a de julio.

Post dekunu hora vojaĝo per kvar trajnoj, mi ekvidis sur la kajo du aliajn francinojn kiujn bonŝance atendis Peter ZILVAR. Georgo HANDZLIK, la dua ŝoforo, atente sekvis la aŭton de Peter ĉar, pro voja vorko en Sieber, la kutima 7,5 kilometra distanco fariĝis 35 km-a ! Pluraj kongresanoj longe serĉis sian direkton al la montara vilaĝo. Cetere kelkaj enaŭte endormiĝis sen trovi ĝin (eĉ ilia GPS ne povis helpi ilin...). Konsekvence, pluraj homoj ne povis ĝui la unuan vesperaranĝon.

La kongresanoj tranoktis ĉu en hotelo « Zum Pass » kies la du deĵorantoj scipovas Esperanton, ĉu en feridomoj „Haus Diana“ kaj „Haus Sonnemann“, ĉu en sia ruldomo. Ĉiu matenmanĝis surloke. Bonŝancaj estis la gastoj de la hotelo pro germana matenmanĝo kompare kun la internacia malpeza de la aliaj tranoktejoj ! Neniu butikoj en la vilaĝo por ion aĉeti sed du trinkejo-restoracioj por trinki grandajn bierojn. Ni bone tagmanĝis kaj vespermanĝis en la hotelo de la polaj posedantoj kiuj regalis nin.

El la tri ekskursoj, mi preferis Harz-montan trarigardon (nacia naturparko) malgraŭ la dimanĉa nebulo kaj la piedviziton en Goslar-mezepoka centro (en la UNESKO mondkulturheredaĵa listo) : imperiestra palaco, faktrabdomoj, katedraloj, sonorilludo... Marde, la vizito de Hannover postulis longan busveturadon. Ni marŝis laŭ modernaj kaj komercaj avenuoj sed la plej memorinda

vidindaĵo estis la pompa urbodomo.

Ĵaŭde, pluraj privataj aŭtoj kondukis nin en HERZBERG. Anstantaŭ gvidi siajn pasaĝerojn al la oficiala urba akcepto en la kastelo, Yutta prave preferis montri al ni la Zamenhof-statuon kaj precipe la «Esperanto-Café »-on kie koreino proponas multajn diversajn teojn, kukojn kaj... naturajn aziajn kuracilojn. Ŝia germana edzo (naturkuracisto) verkis libron pri la germanaj bieroj. Post tiu agrabla paŭzo, ni libere aliris la urban bibliotekon kun Esperanta sektoro, la turisman oficejon kun kelkaj E-dokumentoj, la fasadon de la Herzberga Interkultura Centro (I. C. H.) kaj ĝian E-flagon.

Ege riĉaj kaj interesaj estis la prelegoj, la vesperaj aranĝoj la diversaj interŝanĝoj pri la nuna vivo, lingvoj kaj asocioj. Inter la partoprenantoj estis HO Song, talenta artisto kaj prezidanto de la organiza komitato de la SAT kaj UEA kongresoj (eble ankaŭ de ILEI) en Koreujo en 2017 Poste, grupo kunveturis ĝis Nitra (Slovakujo), kie pasintjare kongresis SAT, por partopreni la ĉi-jaran Universalan Kongreson de UEA. Ĝis 2017 en SEULO kie HO Song bonvenigos nin !

Anne-Marie LEPREVOST (Flers)

Ekspresa intervjuo de Anne-Marie

N.E : Partoprenis 90 homoj la kongreson de SAT el 19 landoj kaj 4 kontinentoj.

Ĉu la programo estis riĉa ?

A-M L. : Tre ! Koncerto de Ĵak Le Puil kaj Serge Sire, teatraĵo, tea ceremonio, kaj multaj prelegoj : ekz. de Rob Moerbek (« monda federalismo » kaj « stila ekzercoj »), Guy Martin (« klimato ŝanĝo kaj kapitalismo »), Arko (polueco en Ĉinio), Vito Markov (rajtoj de la bestoj), ktp. Sed plej impresis min la prelego de Andreas Langhof pri «justa komerco en daŭripova mondo »... nur post 20 monata lernado de Esperanto.

N.E : Ĉu vi konsilas la viziton de la Herzberga Centro ?

A-M L. : Ĝi tre aktivus por Esperanto. Ni povus organizi komunan restadon por la normandoj !!!



MIAJ UNUAJ ESPERANTISTAJ PAŜOJ

Plenumante peton de S-ro Nicolas, mi surpaperigas ĉi poste, kelkajn rememorojn pri mia esperanlistigo kaj pri miaj unuaj uzokazoj de la internacia lingvo.

Kiam mi estis 15 jaraĝa, en 1943, en liceo mi lernis la anglan, la hispanan kaj la latinan. Mia profesoro de hispana estis karisma kaj interesega junulo ; li tre inteligente etendis siajn lecionojn al etimologio, elementa lingvistiko, komparoj kun aliaj lingvoj ... Tiel, mi entuziasme komencis interesiĝi pri lingvoj ; mi ekzamenis lernolibron de la itala kiun posedis mia patrino, lernis iom de la portugala kun portugala samklasano, kaj iom post iom mi kutimiĝis aĉeti ĉe la librobokantistoj de la Sejnokajoj (bouquinistes des quais de la Seine), la plej diversajn lernolibrojn de lingvoj kiujn mi hazarde renkontis, se ilia prezo estis ĉe atingopovo de mia monujeto. Tiel, mi aĉetis almenaŭ dudekon da tiaj libroj, inter kiuj pri la persa lingvo, la bulgara, la araba, ...

Sed iutage, okazis la lumfrapo ! Mi falis sur libron de 1933 de iu Chavet-Warnier, por lernado de Esperanto. Mi jam estis aŭdinta paroli pri tiu lingvo, sed krom ĝia nomo, mi nenion sciis pri ĝi. Mi do aĉetis la libron, kaj reirinta hejmen, komencis ĝin tralegi. Tiam mi ekvidis ke temas pri lingvo tute ne simila je la aliaj, pro ĝia artefariteco, ĝiaj celoj, kaj ĝia eksterordinara simpleco kompare kun la lingvoj kiujn mi jam estis ekzameninta. Ĉio en ĝi al mi plaĉis. Post eble unu monato, mi estis akirinta la substancan medolon (La "substantifique moelle", voir Montaigne) de mia nova libro. Mi do komencis propagandi pri la ideo en mia rondo, ... kiu en 1943, mi esprimiĝas per litoto, dum tiu milita tempo, en la pariza regiono, ne estis aparte favora grundo.

Dum pluraj jaroj mi ne havis okazon renkonti unu esperantiston kaj praktike elprovi miajn konojn. Mi tute ne sciis kie kaj kiel kontakti aliajn eventualajn samfrenezulojn kiel mi. Mi estis fabrikinta verdan stelon sur blanka fundo, el pentrita kartono, kiun mi portis ĉe butontruo, kaj iutage, eble ĉirkaŭ 1946, okazis la miraklo. Mi promenadis surtrotuare en Parizo, kiam eble kvardekjaraĝa nekonatulo min alparolis :

! - He, junulo, vi havas verdan stelon, ĉu vi estas esperantisto ?

! - Mi neniam praktikis la lingvon, kaj mi konsideras min nur kiel propagandisto.

Kaj ni longe daŭrigis la konversacion en la franca. Li informis min pri la ekzisto de SAT-amikaro, min kondukis al la oficejo de tiu organizaĵo, rue Gambetta se mi bone memoras. Poste, mi iom foje ĉeestis kunvenojn en la sidejo de tiu asocio. Tiel mi komencis iom apliki miajn teoriajn konojn, kaj lernis pri la ekzisto de UEF, kaj de UEA kaj de ĝia monda reto de delegitoj. Ĉar mi nepre intencis estonte multe vojaĝi, tio aparte interesis min.

Kaj venis 1948, kaj la aĝo 20 jaroj. En aprilo mi ricevis kunvokilon pri la militista servo : mi devis prezentiĝi la 3-an de majo matene en la kazerno Bessières en Parizo (17), por foriro al Maroko, en la "Premier RTM" (Régiment de tirailleurs marocains) en Port-Lyautey (nun Kenitra). La saman tagon, vespere, mi estis envagonita kun ducento da samaĝuloj, alirlokale Marseille. La 4-an de majo, je la 12-a, ŝipo nin forportis al sudo. Estis mirinde ! Ni atingis Casablanca tri aŭ kvar tagojn poste, kaj tuj, civilvestitaj kun nia valizeto enmane, lacegaj, ni estis senditaj kamione al la kazerno de nia regimento en Port-Lyautey (Camp Segond).

Estis por ni ĉiuj, peniga elradikigo, apartigo de niaj familioj, geamikoj, fianĉinoj ofte, vivo en kazernaj ĉambregoj komunaj por trideko da socie malsamaj homoj, perdo de ĉiu ligilo kun la civila, libera vivo, kun samlandanoj krom kun aspraj karieraj suboficiroj. Kaj nia enfermigo daŭris dum eble unu monato, la necesan tempon por ke ni fariĝu prezentindaj soldatoj kiuj sciis konvene vestiĝi, marŝi kaj saluti. Tiam ni komencis rajti iom, foje, eliri el la kazerno kaj promeni en la urbo. Sed kien iri, kion fari ? Kvankam iom nombraj, la lokaj francoj havis siajn proprajn vivojn kaj ne tre interesiĝis pri kulture tre malsamaj junaj metropolitanoj. Sed mi havis eksterordinaran privilegion (de la latina "privata lex" = loi privée, personnelle) : Mi parolis esperanton kaj posedis la adreson de la loka Asocio, kie mi estis mirinde akceptita. La grupo estis multnombra, tre aktiva, ĝenerale juna. Sed mi ĉesis ĝin frekventi post tri monatoj, kiam mi estis sendita en Alĝerion. Mi ne imagis ke mi refrekventus ĝin iam, kiam tri jaroj poste, denove civilulo, ŝtatoficisto pri vorkado, mi estis enoficigita en ... Port-Lyautey, kie mi retrovis kelkajn el miaj konatuloj. Sed tio estas alia ĉapitro pri kiu mi jam skribis en nia Normanda Esperanto Bulteno, numeroj 208 (2001), 223 (2005), 247 (2011).



Henri ROUSSEAU

VILNIUS, RIGA, TALLINN.

Se vi prirevas vastajn arbarojn kun betuloj, pinoj kaj altaj fagoj, profundajn lagojn kun pimpaj plotoj kaj voremaj ezokoj, se vi preferas maron kvazaŭ sensalan kun sablaj strandoj kaj malprofundaj akvoj, nepre feriu en la baltaj landoj. Tro ofte nekonataj, **Litovio, Latvio kaj Estonio** meritas viziton ne nur pro sia naturo sed ankaŭ pro siaj malsamaj historioj kaj kulturoj.

Kadre de tridekpersona grupo organizita de Interaĝa Universitato de Iŝs (14), ni vizitis la ĉefurbojn kaj aliajn vidindaĵojn fine de majo. Tallinn ŝikas kun sia tre turista centro kaj malnovaj domoj. Ĝi estas granda haveno kiel Riga, la riĉa ĉefurbo de Latvio, sub longperioda germana influo, kiun beligas rimarkindaj domoj «nova arto» stilaj. Sed mi preferis la ĉefurbon de Litovio Vilnius, ĉarma urbo kun multaj placoj kaj trankvilaj stratetoj. Modesta sed akceptema kun granda universitato.

Dank'al la klarigoj de la tri sinsekvaj ĉiĉeronoj kaj la (tro ?) multaj vizitoj de monumentoj, muzeoj kaj preĝejoj, ni ekkonsciis, ke tiuj landoj, lingve, kulture kaj historie forte distingiĝas unu de la aliaj. Dum Litovio, tre katolika, havas komunan historion kaj nunajn rilatojn kun Pollando, Estonio orientas siajn kulturan kaj

ekonomian vivojn al Finnlando kaj Svedio. En la tri landoj, oni uzas Eŭrojn kaj videble aliĝo al la Eŭropa Komunumo tre helpis ilin por plibonigi sian ekonomian situacion post la soveta periodo kvankam la vivniveloj restas tre malaltaj kompare kun Francio.

Kiel Pollandon kies historio estis longperiode komuna, katolikismo forte influas Litovion. Religio havas malpli grandan influon en la du aliaj baltaj landoj. Ĉie ankaŭ staras ortodoksaj preĝejoj pro longa altrudo de la rusa imperio. Cetere, kvarono de la loĝantaro en Estonio kaj Latvio estas rusdevena. La integriĝo de tiu forta minoritato ne ĉiam okazis glate sed la novaj generacioj flue uzas la naciajn lingvojn. « La rilatoj kun miaj rusdevenaj kolegoj estas bonaj, asertis al mi estona esperantisto, sed ni evitas iujn tiklajn punktojn. » Ni tre ofte surstrate aŭdis la rusan kaj multaj budoj en la rimarkinde bela kaj abunde provizita bazaro en Riga skribis la nomon de la varoj en la latva kaj en la rusa lingvoj. Dum la soveta periodo, reprezalioj forte tuŝis la baltajn popolojn ĉefe post la dua mondmilito kaj nun la tri landoj kun malpli ol 7 milionoj da loĝantoj timas plu sian grandegan najbaron.



Kiel ofte en organizita vojaĝo, la grupo havis neniun kontakton kun la loĝantaro kaj ricevis nur la klarigojn kaj analizojn de la ĉiĉeronoj. Nur mia edzino kaj mi povis konversacii kun lokuloj en ĉiuj ĉefurboj, dank'al esperanto.

Antaŭ la vojaĝo, **mi uzis la Jarlibron de UEA** por kontakti delegitojn. Ili ĉiuj respondis sed pro diversaj kaŭzoj informis min, ke ili estos for dum mia vojaĝo. Tamen ili transdonis mian retmesaĝon al siaj klubanoj.

La afero estis tre efika ĉar tuj post nia alveno en hotelo, ni ricevis telefon Alvokon aŭ la hoteldeĵoranto donis al ni mesaĝon por rendevui kun lokaj samideanoj.

En Riga, ni havis interesan konversacion pri pasinteco kaj nuneco en Latvio kun Biruta kaj Aris kaj en Tallinn Tonu parolis pri siaj ĉiutaga vivo kaj laboro kiel bestkuracisto.

En Vilnius, ni trinkis vinon en apartamento ĉe la katedrala placo kun Algimantas dum tre agrabla sunsubiro.

En Vilnius, mi ankaŭ tre ĝojis pasigi tutan vesperon kun Laimius, malnova amiko kiu vizitis nin en 1988. Ni longe korespondis ekde la komenco de la okdekaj jaroj. Laimius kiel ĵurnalisto kaj lerta esperantisto (li esperantigis plurajn librojn kaj ofte raportas en « Monato ») helpis min progresi en la uzo de la lingvo. Dum la soveta periodo, dank'al liaj informriĉaj leteroj mi iom post iom komprenis, ke Litovio havas tre specifajn historion kaj kulturon.

Ke esperanto helpas rompi la lingvan baron kaj ebligas tre utilajn kaj agrablajn kontaktojn por la vojaĝantoj ne estas nur argumento por varbi novajn samideanojn. Spertu tion dum viaj eksterlandaj restadoj. Nepre !

I. Greken.

Ha ! La bela normanda somero !

Kian esceptan programon Normandio proponis al ni ĉi-somere ! Laŭplaĉe, oni povis elekti belartajn manifestaciojn en diversaj urboj, eĉ urbetoj, kadre de la « **Impresionista Normandio** », ĝenerala titolo donita al tiu kultura iniciato. Ĝi konsistis el budeko da artaĵoj, ne nur pikturaj, skulptaj, fotaj sed ankaŭ muzikaj, dancaj, kinaj. Sen forgesi vivantajn spektaklojn, eĉ « selfiojn ».

Femme assise sur un rocher



eau forte de **F. Buhot** d'après un original de Louise Abbéma.

Ni unue vizitis en **Giverny**

« **Caillebotte**, pentristo kaj ĝardenisto ».

Longtempe taksite amatora, diletanta artisto aŭ simple malavara mecenato, ĉefa subtenanto de siaj impresionistaj amikoj (unurange Claude Monet), Caillebotte figuras nun kiel konsiderinda artisto de la impresionista skolo.

Tiu ekspozicio prezentis centon da pentraĵoj kaj desegnaĵoj precipe en rilato kun lia pasio por hortikulturo kaj, ne atendite de riĉulo, kun lia forta zorgemo pri la lacigaj taskoj de la laboristoj. Ne nur artisto sed ankaŭ sportisto kaj praktikanto de jaktado, tiu kortuŝa talentulo sukcesis pentri la surakvan lumon kaj sagaceelvoki la koloron .
Ve ! Tro frue li mortis, kvardek ses jaraĝa.

Ni poste aprezis la ekspozicion en la **MUMA de Le Havre** pri **Eugène Boudin** : impresa retrospektiva prezento de 200 verkoj dediĉitaj al tiu kiun oni nomis « la patro de Impresionismo ». Liaj skizoj, liaj promptaj desegnaĵoj celas kapti efemerecon. La Belarta Muzeo de Rouen prezentis, tra verkoj de Monet, Manet, Renoir, Morisot kaj aliaj, la rimarkindan evoluon de la tiama vivmaniero, la statuson de la virinoj, de la infanoj, de la artistoj.

En **Caen** (Belarta Muzeo), ni vere malkovris **Fritz Thaulow** (1847-1906). Tiu norvega pentristo ofte kaj longe restadis en Francio, multe vojaĝis en Eŭropo kaj tiel akiris internacian karieron. Precipe ekstera-ateliera pentristo, li « plantis » sian stablon tien aŭ tien-ĉi kaj kia ajn estis la vetero por pentri ĉirkaŭajn pejzaĝon kun rigardo kiun oni nun taksus ekologiista. Lia talento de koloristo rapide logis samepokajn artistojn, ĉefe lian amikon Monet, kaj lian kuzon Munch.

En **Cherbourg en Cotentin**, trafe kortuŝis nin la verkoj de **Félix Buhot** (1847-1898). Tiu artisto devena de Valognes dividis sian vivon inter la normandaj kaj bretonaj marbordoj, Parizo kaj Londono. Li regis kvazaŭ ĉiujn artajn teknikojn : oleopentron, akvarelon, guaŝon, paŝtelon kaj admirinde stampobildon.

Ĉiu paŝo lia estis inspirfonto : la kompreneble pitoreska vivo de la normanda kamparano, pluvo, kato, ŝtormo, nebulo, bestoj sed ankaŭ la agitado de la grandaj urboj kiel Parizo kaj Londono... Ĉio kontribuis por ke li estu « la pentristo de la atmosferoj ». Pro priliteratura klereco, scipovo de la latina kaj de la greka lingvoj, li hezitis inter literaturo kaj pentroarto. Finfine, pere de komuna konatulo, li amikiĝis kun Barbey d'Aurevilly kiun prezentis lin al Alphonse Lemerre, fama eldonisto de « Parnasanoj ». Tiele, li ilustris « Le Chevalier des Touches » kaj « Une vieille maîtresse »... kiuj certigis al li grandan sukceson. Li poste ilustris por aliaj eldonistoj verkojn de Victor Hugo, Alphonse Daudet, k. a..

Konklude, ni longe gardos en memoro tiujn belajn momentojn, kiel atestojn de la kultura vikleco de nia Normandio.

Michelle Paumier

La 29an de majo 2016, **ges-roj SAIKI, Akira kaj Masajo**, forlasis sian domon en Ena por longa vojaĝo tra Eŭropo. Ili unue vizitis Svedion ĝis la 7a de junio kaj alvenis en Roissy la 8an.

Kiel ĝojaj ni estis kiam Akira anoncis sian viziton al ni, en Normandio kaj poste en Alta Morjeno! De longe ni konatiĝis kun ili. Okaze de niaj vojaĝoj en Japanio, ili gastigis nin tri fojojn kaj ankaŭ Brigitte kaj Claude en 2008 kiam dum tri semajnoj ok anoj de Herouville Esperanto vizitis la landon. En 2010, kun ges-roj Kuroyanagi, Akira kaj Masajo aparte plezurigis vizitante belajn regionojn malpli konatajn.

La 8an de julio, pro la strikoj kiuj tiuepoke paralizis la trafikon, ni ne volis lasi ilin solaj fronte al la neeviteblaj malfacilaĵoj. Ĉe la flughaveno ni atendis ilin kaj aŭte revenis kune al Caen.

La dektaga restado de niaj geamikoj en Normandio permesis plenumi ambician programon : Mont Saint-Michel, Bayeux, la plaĝoj de la Elŝipigo, Cabourg, Honfleur, Trouville, Deauville ... Ĉiam ili estis akompanitaj de liaj gastigantoj, Brigitte kaj Pierre, Claude kaj Marie-Anne, Gigi kaj Gerard. La 17an, ĉe Brigitte kaj Pierre, komuna vespermanĝo estis organizita kiu kunigis la disponeblajn klubanojn ĉirkaŭ niaj gastoj.

Fine, Martine per gitaro gvidis niajn ofte hezitemajn vöcojn, Akira, bona kantisto, regalis nin per japanaj kaj esperantaj kantoj kaj Masajo ludis okarinon.

Post restadoj en Parizo kaj Svislando, ili revenis en Francion, la 1an de julio. Ni atendis ilin en Modane. Sekvante niajn konsilojn, ili deziris malkovri nian montaron komence de julio, la plej favora periodo por admiri la alpajn florojn. Vidante la nekredeblan

abundecon de tiom da malsamaj floroj, Masajo ne kapablis bridi siajn ĝojajn ekkriojn! Dume Akira fotis, fotis kaj fotis!

La 5an de julio, ni akompanis niajn japanajn amikojn al Torino kie esperantistoj gvidis nin tra tiu bela urbo.

La duan vesperon ni kune manĝis en restoracio kun deko da esperantistoj kaj ni adiaŭis Akiran kaj Masajon. Provizora adiaŭo ĉar, printempe 2017, ni planis novan vojaĝon al Japanio. Ili jam pretas gastigi nin ankoraŭfoje!

Poste, ili restis du pliajn tagojn en Torino, flugis al Oslo, vizitis Bergen kaj finfine reheimeniris la 16an de julio.

(Gigi kaj Gerard kune skribis la raporton)



Humuraĵoj de Josef Shemer

Dum la Universala Kongreso en Bjalistoko en 2009, la israela esperantisto Josef Shemer proponis aliĝi al sia reta dissendado de judaj humuraĵoj. Ni ĉiusemajne ĝuis tiun amuzan legadon ĝis lia morto en 2012.

Kompleta divido

Du maljunuloj venis al restoracio kaj mendis unusolan pladon de kokinaĵo, terpomoj kaj salato. Ricevinte la pladon la edzo tranĉdividis la kokinaĵon en du egalajn partojn kaj metis la duonon en la edzinan teleron. Poste li prenis duonon de la terpomoj kaj duonon de la salato kaj metis ilin en ŝian teleron.

La rigardanta kelnero ne povis plu elteni (nu, ankaŭ li estis judo...) kaj demandis la edzon: "Sinjoro, kial vi ne mendis du pladojn?"

Respondis la edzo: "Mia edzino kaj mi ĉiam dividas ĉion!"

Tiam la edzo komencis manĝi dum la edzino estis sidanta trankvile kaj ankoraŭ ne manĝis.

Denove la kelnero ne povis elteni kaj demandis ŝin: "Sinjorino, kial vi ne manĝas?"

Respondis ŝi: "Mi atendas la dentojn".



Glacimonto

La piloto Grinberg estas usona judo. La subpiloto Yang estas ĉindevena usonano. Ili flugas kune por la unua fojo. En la komenco ili tute ne interparolas kaj ŝajnas, ke ne regas granda harmonio inter la du pilotoj.

Post duonminuta malagrabra flugo en aerpoŝo murmuris Grinberg (anglalingve):

"La ĉinoj igas min malsana".

Yang: "Kial la ĉinoj?"

Grinberg: "Ĉar ili bombardis Pearl Harbour." *

Yang: "Ne, ne la ĉinoj faris tion sed la japanoj."

Grinberg (kolerete): "Ĉinoj, japanoj, ĉu tio gravas? Vi ĉiuj estas la samaj!"

(Ekregas silento. Neniu el ili parolas dum kelkaj minutoj)


Yang: "Mi..., mi ne amas judojn."

Grinberg: "Kial?"

Yang: "Ĉar la judoj dronigis la ŝipon Titanic.

Grinberg: "Sed ne la judoj faris tion. Faris tion ICEBERG."

Yang: "Iceberg, Goldberg, Rosenberg, Steinberg... Vi ĉiuj estas la samaj!"



KIO NOVA ? nouvelles des clubs



Fête des associations et des bénévoles à Hérouville Saint Clair le 5 septembre

A Tous !
A vos plumes, claviers, crayons, pinceaux, appareils photos pour enrichir notre bulletin normand.

Reprise des cours .

à Flers Maison E. Halbout , quartier St Sauveur
les cours ont repris le 6 septembre

Manche , Granville : à partir du jeudi 6 octobre 10h-11h confirmés - 11h-12h débutants

Le Havre : les cours reprendront début octobre à la salle Perrey; ils seront hebdomadaires et auront lieu de 18 h à 19h 30 le jeudi

Hérouville- Espéranto le mardi 4 octobre de 17h à 18h30 pour les débutants, de 18h30 à 20h pour les confirmés, maison des associations à Hérouville Saint Clair

Herouville-Esperanto
Dum du semanoj, fine septembro, 8 klubanoj vojaĝos en Rusio.
Ili vizitos famajn urbojn kun helpo de lokaj esperantistoj : Tikhvin-on, ĝemela urbo de Herouville, Sankta-n Peterburgo-n, trafante Moskvo-n per nokta trajno .
Mirinda programo... Ĉu ne ?




Adiaŭo sur la kajo de la statio Caen

Extraits du carnet de voyage de notre amie japonaise Yayoi AIDA que l' association Hérouville - Espéranto a reçue avec son mari, 3 autres amies japonaises et le russe Mickaelo Bronjstein au retour du congrès de Lille 2015


Kun "verdanoj" mi vizitis ĝardenon nomatan "Esperanta Placo". La nomŝildo surprizis min, ĉar ne granda urbo kiel Caen havis tiel honorindan lokon por esperantistoj. Dum ni ĉirkaŭrigardis kun francaj geamikoj, venis loka ĵurnalisto kaj fotis nian foton kiel okazaĵon de amika renkonto por aperigi ĝin kun artikolo sekvmatene. Tia ĵurnala perado aŭ helpo ne okazos en Jokohamo, ĉar ne famkonataj sed ordinaraĵoj homoj, precipe esperantistoj, ne povus altiri intereson de publiko. Kun miro mi eniris en la esperanta oficejo bone aranĝia kun libroj, broŝuroj, fotoj, ekspoziciaĵoj, k.a. Mi sentis multe da zorgoj de la membroj, precipe ges-roj Yves kaj Senekal kiel respondeculoj. Sur la muro troviĝis dankmesaĝoj kaj fotoj de vizitantoj el alilandoj, en kiuj mi trovis miajn konatojn. Mi esperis, ke la asocio daŭre sukcesos en la esperantmovado. ヱエルダの人達と「エスペラント広場」という公園に行く。カーンのような小さな町がエスペ란ティストには名誉である看板を掲げていることに驚いた。フランス人の仲間とあたりを見ていると、地元の新聞記者がきて翌朝の新聞に記事とともに掲載する親善写真を撮った。そのような新聞社側の援助・関わりは

横浜ではありえない。ふつうの有名者ではない人間、特にエスペランティストなどは大衆の関心と呼ぶことはない。驚きながら近くの事務所に入ると、本や冊子、写真、展示物などが丁寧に整理されていた。会員やとくに責任者であるイヴやセネカルさんの尽力の結果と思う。壁には外国のエスペランティストからの感謝状や写真が飾ってあった。なかに私の知人もいた。この会のエスペラント運動



PARKING HEREL

Boulevard des Amiraux Granvillais



ĈIUJ EN GRANVILLE LA 8an DE OKTOBRO !

PROGRAMO

Matene

- **10h00 : Rendevuo ĉe la senpaga parkejo Herel** (apud la haveno)
- Vizito de la haveno kaj de la Haute Ville

Tagmanĝo en restoracio (proksimume 15€)

Posttagmeze (ĝis 16h30)

- Promenejo Plat Gousset
- Ĝardeno Dior
- Bestĝardeno

Kaze de aĉa vetero, ni vizitus muzeon.



LE 8 OCTOBRE ? UNE BELLE JOURNEE A GRANVILLE !

Granville, qui ferme la baie du Mont-Saint-Michel par le nord, a de tous temps été un lieu stratégique de première importance. Conquise par les Vikings, elle fut cédée par Guillaume-le-Conquérant à un de ses compagnons, le sieur Grant qui donna son nom à la ville. Les anglais l'occupèrent pendant la guerre de Cent Ans et les Vendéens en firent le siège en 1793.

Mais, mille sabords, ce n'est pas tout ! Louis XIV y créa un port pour « La Course » contre les anglais et le plus fameux de ces corsaires, qui finit ministre pendant la Révolution, fut sans conteste Georges-René Pléville Le Pelley. Il en détroussa des navires, le gaillard ! Sa biographie sur Wikipédia vaut vraiment le détour.

Depuis l'arrivée du train de Paris en juillet 1870, Granville est l'objet d'assauts bien plus pacifiques en maillot de bain et canne à pêche à la main. La station balnéaire a accueilli de nombreuses célébrités comme Stendhal, Michelet et Victor Hugo. Quel plaisir de regarder au loin les îles Chausey, quartier insulaire de Granville, la Haute Ville, le musée Christian Dior, celui du Vieux Granville, le musée d'art moderne Anacréon, l'aquarium.

Granville est aussi célèbre pour son carnaval, la bisquine « La Granvillaise » et son festival " la mer sur un plateau (cette année les 1er et 2 octobre)

On y vient, on y revient, on s'y presse. Il ne manquait plus que la visite de l'association normande d'espéranto au grand complet. Eh bien ! Nous y serons toutes et tous le 8 octobre !



Nom et prénom :

Nombre de personnes* : 1 2 3 4 *entourer la bonne réponse

Nous mangerons au restaurant (environ 15 €) : OUI NON (entourer la bonne réponse)

Parmi vous, des personnes ont-elles des difficultés de locomotion (ça grimpe à Granville !)
OUI NON

Remarque : en cas de mauvais, nous visiterons un musée. Prévoir cette dépense éventuelle.

Ce coupon réponse est à envoyer avant le **25 septembre** à :

Christian LEVESQUE

Christian Lévesque 456, route des Epinettes Saint-Michel-des-Loups 50610 Jullouville

Internet : lesleveque@wanadoo.fr

Portable : 06 48 27 44 93